

PENSEO

N-ro 262

aŭg. / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)




Ĉio pasis kaj ankoraŭ daŭras

traktoro premis marton en potpecojn.
morto min brakumis per tretado.
ĉio pasis kaj ankoraŭ daŭras.
mi feliĉas en la mondoj planta kaj bestara.



akcidento

kulo flugis preter mia dorso.
ĝin per la lasera rigardo mi trafis.
amitabo. min pardonu!
ĝia ombro aŭdigis misilon.



honesteco


la hararo kreskas plante
sur la kapo defaliga.

spite al ismo kaj edifo,
ili perceptas nigron kaj blankon.



sopiro al foreco

al la ĉielo mia gapo sagis.
rivero kuŝas sub domo.
marto estis najlita sur foto.
post kiom da lumjaroj ĝi atingos la anĝelon?



Mori (Usono)



Ho ve...

Blankulo ĉasis
nigran junulon,
kun unu pistolo
en sia poŝo
kaj rasisma pens'
en sia menso!
Okazis batalo
sen bona kial',
li brutale,
kaj senkiale,

lin mortpafis
kvazau li ŝafis!

Ho ve, el l' arbo
de l' sankta Vivo
kun granda dolor'
frukto falis
senmaturiĝinte,
tro frutempe!

En la tribunal',
Blanka Jurio
Blankan murdiston
trovis senkulpa !
Sed observantoj
la verdikton trovis
maldeca, vulpa !

Ne miru kara,
kiel saĝuloj
trafe diras:
en la juĝejo
supraĵa, vulpa
ne lupo, sed ŝaf'
ĉiam estas kulpa !



Petro Palivoda (Ukrainio)



Sonĝo

vi estas sonĝo
diverskolora
fabela
sed ne profeta
vekiĝos mi
kun postploraj okuloj
ripete

vi estis sonĝo



Ni ne bezonas mondan

(aŭ globan),
limigitan
(aŭ lokan)
militon.

Patrino sonĝis nigrajn nubojn
kaj fulmotondron.

Ŝi kuras al la lulilo
kaj super etulo kliniĝas.

Jam ekridetis infano
per pura kaj blua rigardo.

Estu ĉiam ĉielo pura,
estu ĉiam ĉielo blua,
ni ne bezonas nigran!

Paŭlo Silas (Brazilo)




EN LA SAMA VOJO

Allogis akordovol' paradokson
Samcentren de l' aksiomo perfekta.
Por antaŭenigi nian negocon,
Ni kuŝu en pac' kuniga, ne sekta.

Fornaĝi en tutkontraŭan tendencon
Kaj dume disdoni dankon pro tio,
Ke forta rezist' al plua intenso

Instigas decidan veran pasion.



Leieladonna (Meksikio)



*Mi malamas vin
kaj amas vin*

Mi malamas vin kaj amas vin...
kelkajn fojojn...
mi malamas vin pli,
kaj kelkajn fojojn...
mi jam ne amas vin.

Kelkajn fojojn...
ankaŭ mi ne malamas vin...
mi malamas vin kaj amas vin, sed...
sed kelkajn fojojn...
mi jam ne amas vin...

ĉar vi ne estas, kiam vi estas...
ĉar vi estas, sed ne estas...
ĉar estanta, vin ne gravas...
vin ne gravas; nek mi...ne estanta...
ĉar ĉiu klopodo estas vana,
ĉar ĉio estas deliraĵo

kaj la dubo...

ŝira sento.
Ne scii kion okazas,
kion vi gardas...
kion interne vi alportas,
ne fari poezion belan...
ne tiel indu ĝin...
ĉar mi amas vin...
mi serĉas vin.
Mi serĉas vin, mi ne trovas vin,

mi trovas vin, mi ne atingas vin,
mi atingas vin...
mi ne havas vin...
mi havas vin; sen havi vin...
kaj en tiu vana intenco;
tiu kontinua malsukceso,
tiu senutila klopodo,
mi donas ĉion kio mi estas...
kaj vi ne prenas ĝin,
vi ne prenas ĝin...!

kiel frida estas tie ĉi...

kiom da frido...
iu frido kiu brulas,
brulas,
kaj oni gluiĝas je la haŭto,
velkigas la haŭton !
brulas...
dolore,
tiu haŭto kiu perdas freŝecon,
atendante...
kaj atendante, atendante,
kaj atendante...

sen espero, sen io ajn,
jam perdinta la fidon...
dolorante...
doloranta ĝisfunde,
profunde !
tre profunde...
ĉi tie, en la koro...
soifa je vi,
kaj malsatanta
tiom bezonanta vin

ĉio pro amo...
pro amo, malamo...
kelkajn fojojn mi amas vin,
kaj kelkajn fojojn...
ankaŭ mi malamas vin.
mi malamas vin...
sen devi malami vin...
sed mi pli malamas min,

pro amo al vi...

11/07/2011.

Siv Burell (Svedujo)



Iu fiŝkaptas en mia river'

Iu fiŝkaptas en mia river'
 trompas la fiŝojn al ekmordo
 murtigi estaĵojn en mia "propra sfer"
 certe min skuas de la ordo
 Kiel estas la bonaj?
 ĝui manĝon de murtiginta estaj' ?



SCIROCCO

SED MIAJ ONJOJ DIRAS

(poemversio de la rokkantotraduko)

Mi amas vin,
 tre klaras la mesaĝ'.
 Tre belas vi
 kaj plenas eĉ de saĝ'.

Vi plaĉas min,
 sed ne nur pro l' harar'.
 Mi amas vin
 nun jam dum tuta jar'.

Sed miaj onjoj diras:
 "Lasu de l' knabino,
 tro longas la hararo,
 tro kurtas ŝia jup'."

Kaj plaĉas min,
 ke seriozas vi
 kaj ridas plu
 kaj kiel dancas ni.

De nia am'
 mi pli komprenas min.
 Necesas vi,
 mi ne plu lasos vin.

"Ne estu kun la knabo",
 diras ŝiaj onjoj.
 Li ludas ja en ĵazband',
 kaj krome eĉ kun bru'.

Mi aŭdis ke,
 necesas la respekt'
 al onjodir'
 kaj tute ne neglekt'.

Mankas respekt',
 sed ili kulpas mem;
 la onjoj mem
 fariĝis la problem'.

Mi amos plu la karan,
 ni kunestos ĉiam,
 ĉar scias niaj onjoj
 nenion ja pri ni.

* *Scirocco estas fama rokmuzikbando el GDR, ili verkis la muzikon kaj la tekston kaj mi tradukis la tekston en Esperanton, tiel, ke oni povas kanti ĝin. Laste mi faris el tiu kantotradukon poemon, kiu ankaŭ sendepende de la muziko ĝueblas. Do, tio estas iom nekutima formo de iama kantoteksto. La muziko kaj la teksto ekestis en la sesdekaj jaroj, kiam rokmuziko en GDR ankoraŭ ne estis akceptita kaj oficiale speciale de partiaj anoj kritikita kiel dekadenta apero de l' okcidento. La onjoj, estis fakte la ŝtatprezidanto Ulbricht kaj ties koramikoj. Li diris iam: "Ni ne bezonas tiun yeah, yeah, yeah... (jen aludo pri titolo de Beatles.) Do tiu amkanto estas ankaŭ sprita respondo de rokmuzikbando Scirocco (Siroko) al Ulbricht, kaj tion en GDR tiam la adeptoj de rokmuziko tre bone komprenis, tial tiu kanto estis tiel fama por GDR-anoj. Sed ankaŭ la teksto mem kaj la muziko mem estastre ĝuindaj, sen tio, ke oni nepre devas kompreni la fonon de la kantoteksto. Temas ja*

pri amo, kaj tiu estas ĉiam internacia fenomeno. Amo ĉie estas la plej bona respondo al ĉiu agresemo, stulto kaj malico. Vivu la amo! Ĝi estu la vojo kaj la celo samtempe, por ĉiuj homoj surtere.



esperantigis



Cezar (Germanujo)

Agustín Lara (1900-1970)



Serĉu min

Se vin tro afliktas dolor', serĉu min.
Se trafas vin deprima hor', serĉu min.
Fascine min logas ja via beleco,
la buŝo naiva per kies freŝeco
kaptis min amor'.

Serĉu min se vi ploras, se vin premas
sufer' serĉu min, se vi volas
nu jen mia vivo, ĝin forprenu, ĝin mi
donas,
ĝi neniom valoras sen vi.

Serĉu min se vi ploras, se vin premas
sufer' serĉu min, se vi volas
nu jen mia vivo, ĝin forprenu, ĝin mi
donas,
ĝi neniom valoras sen vi.

Serĉu min se vi ploras, se vin premas
sufer' serĉu min, se vi volas

nu jen mia vivo, ĝin forprenu, ĝin mi
donas,
ĝi neniom valoras sen vi.

Originala titolo: Piensa en mí

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)



Mikrorakonto

Yuan Pingyin (Ĉinujo)

Neeldirebla sekreto

Post nelonge kiam li enlitiĝis, li aŭdis frapadon sur la pordo. Li certis sendube, ke tiu viro venas.

Kiam lia patro ankoraŭ vivis, tiu viro ofte frekventis lian hejmon.

Lia patro eĉ levis neniun plendon kontraŭ tio. Kiam tiu viro venis, li grimpis sur la supran etaĝon kaj dormis tie. Kaj poste li mortis ĉagrenplena.

Post lia morto, tiu viro des pli ofte venis kaj fari intimaĵojn kun la patrino.

Ŝajnis, ke la patrino taksis lian alvenon. Ĉiufoje kiam tiu viro alvenis, ŝi ĉiam retenis lin por tranokti.

Ke la viro sen ajna rilato al lia familio kuŝadis kun lia patrino de tempo al tempo, tion li sentis humiliga kaj ofenda.

Sed li povis fari nenion alian ol rezignacie obei la patrinon. Pro tio, ke li estis nur sep-jara kiam lia patro mortis, kaj ŝi ne reedziniĝis pro li, li ne devus interveni en ŝia privata vivo.

Pasis dekkelkaj jaroj. En la vilaĝo oni fervore cirkuligis la famon pri amrilato inter tiu viro kaj lia patrino, kaj kelkaj eĉ klaĉis kontraŭ lia dorso.

Li sentis pikitecon en la koro kaj trovis neniun lokon por sin kaŝi.

Estus nenio, se tiu viro edzinigus lian patrinon, sed la viro havis sian propran edzinon.

Ĉar li baldaŭ edziĝos, li ne volas silenti plu.

Frapado ankoraŭ sonis, kvankam apenaŭ aŭdeble.

Li tuj salte leviĝis el la lito.

Kiam la patrino estis malfermonta la pordon, li baris antaŭ ŝi, dirante: “Panjo, mi baldaŭ prenos edzinon, kaj vi ne povas plu...”

Lia parolo sonis kiel tondro.

Ŝi ekŝanceliĝis kaj preskaŭ stumble falis. Eliginte longan suspiron, ŝi rekuŝiĝis.

Prenante balailon en la mano, li malpeze malriglis la pordon.

Apenaŭ tiu viro enŝoviĝis tra la pordo, li donis al li du batojn per la balailo. Li agreseme diris: “Aŭskultu al mi! En pasinteco mi ne batis vin nur por montri mian respekton al mia patrino. Hodiaŭ mi batis vin por venĝi mian patron. Se vi venus poste, gardu vin, ke mi disrompus viajn hundajn kruojn!”

“Ĉu vi batas min?!” Tiu viro eksentis kaj surprizon kaj koleron.

“Kio do okazas, se mi batas vin?”

“Kio do okazas? Demandu al via panjo pri tio. Via patro ne kapablis generi, kaj mi mem estas via propra patro!”

Fulmotondro! Tion li eĉ ne povis imagi en sia sonĝo...

elĉinigi **Kanglong (Ĉinujo)**




Zhou Hailiang (Ĉinujo)

Pruvo

En arbaro insektoj okazigas konkurson por elekti la plej belan el ili ĉiujare. Kaj la papilio sukcesis gajni ĉampionecon en la konkurso, tamen la libelo rifuzas akcepti la rezulton kaj al juĝistoj demandas, ĉu post plurfoja ŝminkado la papilio ankoraux meritas la titolon “la plej bela” en la konkurso? “La juĝistoj estas tute surprizitaj, ĉar ili neniam aŭdas, ke papilio faras ŝminkadon. Senprecedente! La libelo aŭdace diras: Mi havas la foton de ŝia infanaĝo. Ĉu tio ne estas pruvo?”

Post diskutado la juĝistoj proponas, ke la libelo montru la foton al la publiko. Ili supozas, ke eĉ el la foto de ŝia infanaĝo, oni ankoraŭ povas trovi la belecon de la papilio. Kaj la libelo fierace montras la foton de infanaĝa papilio. Fakte, troviĝas granda diferenco inter la aspekto de la nuna papilio kaj tiu en la foto. Kaj finfine la juĝistoj refoje decidas ne nur nuligi la ĉampionecon de la papilio, sed ankaŭ malpermesi al ŝi partopreni en la venontaj konkursoj pri beleco.

La papilio en la foto, kompreneble, estas nur raŭpo.



elĉinigi



Verdeca (Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



PLUEGO EN JULIO

—laŭ ĉinesko Daolianzi*
 abrupte
 sen avert'
 pluvgutoj per vipa lert'
 draŝas la vojirantojn
 je korpo kaj nuda vert'

la homoj
 sub pelo
 de la pluva anĝelo
 fuĝas tien kaj tien
 kurante en pelmelo

jen pluvo
 subite
 ĉesiĝas senhezite
 akvo ankoraŭ gutas
 de alte malrapide

elvenas
 la suno
 per sufok-arda kuno
 bakas malsekan teron
 kvazaŭ la venĝa puno

la homoj
 kun ĝojrid'
 post la vetera insid'
 sub libera ĉielo
 paŝas kun vesta humid'

ba, kapric'
 vetera
 ludas en fars' opera

per ĝia man' magia
 homojn laŭ vol' libera



*Daolianzi (kanto de lavantino): ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Jadranka Miric (Serbio)



KIAM VENOS MALJUNECO

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Pensiul'.
 Kiel vi fartas?
 Mi kiel bebo, kaj vi?
 Ĉiu nokte mi kartas.
 Oni min vartas..


Hajduko.
 Plu kuraĝulo?
 Mi, Serbo, kverko kora,
 helpadis al povrulo .
 Nun malfortulo.

Futuro?
 Tempo espera.
 Plu retrovi la sanon.
 Kvietigo severa.
 Sento tenera.

Do, lukto.
 Humana sen plor'.
 Por senzorga mezoaĝ'.
 Prevente kontraŭ dolor'.
 Vivu juna kor'.

Maljunec'.

Paroloj en vent'.
 Niveligi la klason
 Kompreno kun bona sent'...
 Ripozo sen pent'.



Ankoraŭ unufojon

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Saluton!
 Forta manpremo.
 Perlas larmoj amaraj.
 La arogantemo?
 Aŭ laciĝemo ?

Adiau`.
 Torento en kor`.
 Hazarda renkontiĝo
 kaj ne atendita plor`.
 Peza la dolor`.

Iame,
 Amo kiel pin`..
 Ĝoja rido ligas nin.
 Ni ne pensis pri la fin`.
 Ni tre amis nin.

Vi kaj mi
 Vigla ,gaja rid`.
 Ondo da kisoj al vi
 pro nia unua vid`.
 Al ies avid`.

Ve ,tempo.
 pasas rapide .
 Restis la vivo spuroj.
 Moke aŭ iom ride
 Jesu konfide.

poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
 xa,xa,a (x=senrima).

Lily (Ĉinujo)

Morna vidvino

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

1.

en granda domo
 ŝi vivas sola
 pasigas siajn tagojn
 senkonsola

jen ŝi kuŝiĝas
 sur sofo mola
 jen paŝas tien reen
 ja senparola

2.

ĉu pro impulso
 ĉu pro aspiro
 ŝi eksentas varmegon
 de seks-deziro

ŝi ŝiras harojn
 per daŭra tiro
 turniĝadas sur lito
 kun peza spiro

3.

mampintoj duras
 malsekiĝas tru'
 ŝi palpas, gratas, krias
 kun freneza bru'

ŝi anhelante
 en fortega sku'
 kaptas siajn mampintojn
 knedas ilin du

4.

per mano trema
 palpas leĝere
 ŝi la sukplenan subon
 ekscite vere

*Sopir-al-sudo (Ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksoforma

ŝi ŝovis fingron
senbariere
en la truon kaj kirlas
ĝoje libere

5.

kia ekstazo!
dum memkonsolo
ŝi kolapsas sur lito
kun kora folo

la onanado
ŝajnas frivolo
fakte kontentigas ŝin
ja sen amoro

Yanke (Ĉinujo)

Koro en vento

—laŭ ĉinesko Busuanzi*
koro flirtadas
kiel fal-foli',
sed ne volas putriĝi
sur ter' – finstaci'

ĝi strebe flugas
jen kun ambici'
al la blua ĉielo
de bel-fantazi'

sed al ĝi mankas
forta energi'
pro mema pezo sinkas
senespere ĝi

malsupren falas
kun malhelpa kri'
en profundan abismon
ĝi ja sen konsci'



*Busuanzi (aŭguristo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona

rimo.

Maupassant (1850-1893)



LA PINGLO

Nek la nomon de la lando, nek tiun de la viro, mi diros. Tio okazis malproksime, ja malproksime de tie ĉi, sur fekunda kaj varmega marbordo. De tiu mateno, ni sekvis la marbordon kovritan per rikoltoj kaj la bluan maron kovritan de suno. Floroj kreskis tute proksime de la ondoj, leĝeraj ondoj, mildaj kaj dormigaj. Estis varme, unu el tiuj molaj varmoj parfumitaj de grasa tero, malseka kaj fekunda, oni kredis spiri ĝermojn.

Tiun vesperon oni diris al mi, ke mi trovos gastadon en la domo de la franco, kiu loĝis ĉe la fino de promontoro, en oranĝarbaro. Kiu li estis? Tion mi ankoraŭ ne sciis. Li estis alveninta iun matenon antaŭ dek jaroj, li aĉetis grundon, plantis vinberujojn, semis grajnoj. Tiu viro laboris kun pasio, kun furiozo. Poste, monaton post monato, jaron post jaro, li plivastigis sian bienon, senĉese fekundigante la virgan kaj potencan grundon, tiamaniere li amasigis kapitalon dank'al sia nelacigebla laboro.

Tamen laŭdire li daŭrigis labori. Staranta ekde aŭroras, li trairis siajn kampojn ĝis noktiĝas, senĉese li priatentis, li ŝajnis incitadi de fiksa ideo, turmenti de la nesatigebla deziro de mono, kiun nenio endormigas, nenio kvietigas. Nun li ŝajnis tre riĉa.

La suno subiris kiam mi atingis lian loĝejon, efektive ĝi stariĝis ĉe la fino de kabo, meze de la oranĝarboj. Estis larĝa kvadrata domo, tute simpla, kiu superis la maron.

Dum mi alproksimiĝis, viro kun granda barbo aperis ĉe la pordo. Salutinte lin, mi

demandis al li azilon por tranokti. Ridetante li etendis al mi la manon.

- Eniru, sinjoro, estu tie ĉi kiel hejme !

Li kondukis min en dormoĉambron, metis sub miaj ordonoj serviston, kun perfekta facileco kaj bona familiara gracieco de mondumano. Poste li forlasis min dirante :

- Ni vespermanĝos kiam vi ja volos malsupreniri.

Fakte, ni duopintime vespermanĝis sur teraso fronte al la maro. Unue mi parolis al li pri tiu lando tiom riĉa, tiom malproksima, tiom nekonata... Li ridetis, kaj respondis malatente :

- Jes, tiu tero estas bela. Sed nenia tero plaĉas malproksime de la virino, kiun oni amas.

- Vi bedaŭras Francion, ĉu ?

- Mi bedaŭras Parizon.

- Kial vi ne reiru tien ?

- Ho ! Tien mi revenos.

Kaj, tre kviete, ni ekparolis pri la franca mondo, la bulvaroj kaj la Parizaj aferoj. Li pridemandis al mi kiel homo, kiu konis tion, citis al mi nomojn, ĉiujn familiarajn nomojn sur la trotuaro de la Vodevilo.

- Kiun oni vidas nun ĉe Tortini ?

- Ĉiam la samajn, krom la mortintojn.

Mi rigardis lin kun atento, obsedata de nepreciza memoraĵo. Jes ja, mi jam vidis tiun kapon... Sed kie ? Sed kiam ? Li aspektis laca, kvankam vigla, malgaja, kvankam firma. Lia granda blonda barbo falis sur lia brusto, kaj iafoje li ekprenis ĝin apud la mentono, premis ĝin en sia mano refermita, kaj glitigis ĝin ĝis la fino. Iom kalva, li havis densajn brovojn kaj fortajn lipharojn, kiuj miksiĝis kun la vangharoj.

Malantaŭ ni la suno enprofundiĝis en la maron, eljetante sur la marbordon nebulon de fajro. La florantaj oranĝarboj eligis en la vesperan aeron sian ravan kaj fortegan aromon. Li vidis nur min, kaj kun fiksa rigardo, li ŝajnis ekvidi en miaj okuloj, en la fundo de

mia animo, la malproksiman bildon, ŝatatan kaj konatan, de la larĝa ombra trotuaro, kiu interrilatigas la preĝejon Magdalena al la strato Drouot.

- Ĉu vi konas Butrelo ?

- Jes, ja.

- Ĉu li multe ŝanĝis ?

- Jes, li estas tute blanka.

- Kaj La Ridamio, ĉu ?

- Ĉiam sama.

- Kaj la virinojn, ĉu ? Parolu al mi pri la virinoj. Ni vidu. Ĉu vi konas Suzana Vernerio ?

- Jes, tre forta, rafinata.

- Ha ! Kaj Sofia Astio, ĉu ?

- Mortinta.

- Kompatinda knabino ! Ĉu... Ĉu vi konas...

Sed li abrupte silentis. Poste, kun la voĉo ŝanĝita kaj la vizaĝo subite paliĝinta, li reparolis :

- Ne, estas preferinde, ke mi ne plu parolas pri tio, tio tro suferigas min.

Poste, kiel por devojigi la fluon de liaj ideoj, li sin levis.

- Ĉu vi volas reeniri ?

- Volonte.

Kaj li antaŭiris min en sian hejmon.

La malsupraj ĉambroj estis grandegaj, nudaj, malgajaj, ŝajnis forlasitaj. Teleroj kaj glasoj miskiŝis sur tabloj, lasitaj tie de servistoj kun sunbruna haŭto, kiuj senĉese vagis en tiu vasta loĝejo. Du pafiloj alkroĉitaj per du najloj pendis ĉe la muro ; kaj en la anguloj oni vidis ŝpatojn, fiŝfadenojn, sekiĝintajn foliojn el palmarboj, objektojn el ĉia speco metitajn ĉie laŭhazarde de la eniradoj, kaj kiuj troviĝis atingeblaj okaze de la eliradoj kaj la laboroj.

Mia gastiganto ridetis :

- Estas la loĝejo, aŭ plivole la loĝejaĉo de ekzilito, li diris, sed mia dormoĉambro estas pli pura. Ni iru tien.

Enirante mi kredis, ke mi eniru en la magazenon de brokantisto, tiom ĝi estis plenigita da aĵoj, heterogenaj aĵoj, bizaraj kaj diversaj, kiujn oni sentas esti memoraĵoj. Sur la muroj estis du belaj desegnaĵoj far famkonataj pentristoj, ŝtofoj, armiloj : spadoj kaj pistoloj. Poste, precize meze de la ĉefa panelo, oni vidis kvadraton el blanka sateno ore kadrita.

Mirigita, mi alproksimiĝis por vidi, kaj mi ekvidis harpinglon enpikitan meze de la brilanta ŝtofo.

Mia gastiganto metis sian manon sur mian ŝultron :

- Jen, li diris ridetante, la nura aĵo, kiun mi rigardas tie ĉi, kaj la nura aĵo, kiun mi vidas de antaŭ dek jaroj. S-ro Prudhomme¹ proklamis : "Tiu sabro estas la plej bela tago el ma vivo", mi povas diri : "Tiu pinglo estas mia tuta vivo".

Mi serĉis banalan frazon, kaj fine prononcis :

- Vi suferis pro virino, ĉu ?

Li abrupte reparolis :

- Diru, ke mi suferas kiel mizerulo... Sed venu sur mian balkonon. Post momento, alvenis al miaj lipoj nomo, kiun mi ne aŭdacis prononci, ĉar se vi respondus "mortinta", kiel vi prononcis pri Sofia Astio, mi dispafus al mi la cerbon, tiun tagon mem.

Ni estis elirintaj sur la larĝa balkono de kie oni vidis du golfojn, unu dekstre, kaj la alia maldekstre, kiujn altaj grizaj montaroj ĉirkaŭis. Estis la krepuska horo, kiam la malaperinta suno ne plu lumigas la teron per la ĉielaj rebriloj.

Li reparolis :

- Ĉu Johana de Limur ankoraŭ vivas ?

Lia okulo, plena da tremetanta angoro, fiksas la mian.

Mi ridetis :

- Nepre... kaj ŝi estas pli bela ol neniam.

- Ĉu vi konas ŝin ?

- Jes.

Li hezitis :

- Mi volis diri : ĉu vi bone konas ŝin ?

- Ne.

Li ekprenis al mi la manon :

- Parolu al mi pri ŝi.

- Sed nenion mi havas por diri, ŝi estas unu el la virinoj, aŭ plivole unu el la knabinoj la plej ĉarmaj kaj la plej taksataj en Parizo. Ŝi travivas agrablan kaj princan ekzistadon, jen la tuto.

Li murmuris : "Mi amas ŝin" kiel se li diris : "Mi tuj mortos". Poste, abrupte :

- Ha ! Dum tri jaroj, nia ekzistado estis samtempe terura kaj delica. Mi preskaŭ mortigis ŝin kvin aŭ sesfoje ; ŝi provis krevigi al mi la okulojn per tiu pinglo, kiun vi ĵus vidis. Jen, rigardu tiun malgrandan blankan punkton sub mia maldekstra okulo. Ni nin amis reciproke ! Kiel mi povus klarigi tiun pasion ? Vi ne komprenus ĝin.

Devas ekzisti simpla amo, farita el duobla impeto de du koroj kaj du animoj. Sed nepre ekzistas kueleaga amo, kiu ege turmentadas, farita el nevenkebla stringado de du misharmoniaj estaĵoj, kiuj sin abomenas kaj samtempe sin adoras reciproke.

Tiu knabino tute senhavigis min en tri jaroj. Mi posedis kvar milionojn, kiujn ŝi malŝparegis kun ŝia kvieta mieno, trankvile, kiujn ŝi formanĝis kun milda rideto, kiu ŝajnis fali el ŝiaj okuloj sur ŝiajn lipojn.

Ŝin vi konas, nu ! Ŝi havas en si ion nerezistebla... Kio ? Mi ne scias. Ĉu estas ŝiaj grizaj okuloj kun rigardo, kiu eniras en vin kiel borileto, kaj restas en vi kiel sagohoko ? Estas plivole tiu milda rideto, indiferenta kaj alloga, kiu restas sur ŝia vizaĝo kiel masko. Ŝia malrapida gracieco iom post iom penetras, eliĝas el ŝi kiel parfumo, el ŝia longa talio, apenaŭ svingiĝanta, kiam ŝi pasas, ĉar ŝi ŝajnas gliti plivole ol marŝi, el ŝia voĉo iom trenanta, bela, kiu ŝajnas esti la muziko de ŝia rideto, el ŝia gestoj ankaŭ, kiuj estas ĉiam precizaj kaj moderaĵ, kaj kiuj ebrias la okulojn

